# JEN

BULTENO DE LA JUNULARO ESPERANTISTA DE NORD-AMERIKO

Numero 6 — Februaro 1963

Sendu monon al: S. COHEN, 16 Long Ave., Allston 34, Mass.
Ĉion por Redakcio al: K. MINER, 42 Ave. B /2d, NYC 9.
Ĝeneralaĵojn sendu al la sekretario: R. KOLLIN, 30 Ave. B, NYC 9.

JARABONO: $1.00 aŭ egalvaloro

JARMEMBRECO kun JARABONO: $1.00

## 1963 - Jaro de la Junularo

En la januara numero de la revuo 'Esperanto' estas anoncite ke 1963 estos en la Esperanto-movado la Jaro de la Junularo, kaj ke UEA kaj speciale TEJO kaj ties sekcioj faros dum 1963 apartajn klopodojn plivastigi sian agadon inter la junularo per pli intensa varbado, informado kaj - en landoj kie ne ekzistas sekcioj - starigo de novaj TEJO-sekcioj.

Inter la plej gravaj projektoj de la Jaro de la Junularo estas la starigo de junulara gazeto, kiu estu samtempe la oficiala organo de TEJO, internacia kunligilo inter la junaj geesperantistoj, kaj verva kaj interesa revuo por la tuta Esperantista junularo.

Ni kompreneble celas ke la gazeto estu finance sendependa kaj subtenu sin mem pere de siaj kotizoj. Tamen, TEJO bezonas bazan financan rezervon por la aperigo de provnumero kaj la varbado de abonantoj.

Tiucele UEA starigis la Fondaĵon Junulara Gazeto, kiu funkcias kiel aparta kaso de UEA je la dispono de TEJO.

Ni do alvokas al ĉiuj Esperantaj gazetoj ne nur grandskale doni sian apogon al la Jaro de la Junularo, per aperigo de artikoloj kaj informoj pri ĝi, artikoloj de gejunuloj ktp., sed tute speciale vaste anonci la starigon de la Fondaĵo Junulara Gazeto, kaj doni detalojn pri la metodo ĝiri kontribuaĵojn al ĝi.

La kaso de la Fondaĵo Junulara Gazeto troviĝas ĉe la CO de UEA en Rotterdam (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando). Oni transpagu kontribuaĵojn per la jenaj metodoj:

1. Al landaj perantoj aŭ ĉefdelegitoj de UEA, kun peto ke ili ĝiru la sumon en la Fondaĵon.
2. Rekte al UEA, kun sama peto.
3. Al landaj sekcioj de TEJO.
4. Al la Kasisto de TEJO (Humphrey Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge 38, Mass., Usono, aŭ ĉe JEB, Grit Howe, South Park, Gerrards Cross, Bucks., Anglujo).
5. En nepagipovaj landoj al kaso jam de TEJO skribe aprobita en la koncerna lando. Estos eble per simila metodo poste aboni la gazeton.

Se eble, bonvolu post aperigo sendi ekz-on de ĉiu artikolo pri la Fondaĵo al la Kasisto de TEJO, kiu ankaŭ pretas liveri al vi pliajn informojn laŭbezone, kaj eventuale aranĝi pri la verkado de gazetartikoloj pri la Jaro.

Tre sincere via,

GÜNTHER BECKER, Prezidanto
MAREK PIETRZAK, Ĝenerala Sekretario
HUMPHREY TONKIN, Kasisto

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.

## KIEL ESTIGI ESPERANTO-KLUBON EN KOLEGIO AŬ UNIVERSITATO

El ĉiaj terenoj de la mondo, eble la kampoj kolegiaj plej fekundas por la kreskado de Esperanto. Tie, ĉe la kolegioj, kune loĝas kaj reciproke penspikas centoj, kaj ofte miloj, da junuloj. Al ili la aĝo ankoraŭ ne hardis la opiniojn. Kaj oni povas atingi ilin, kaj influi ilin, tre efike kaj et-koste, per abundaj komunik-rimedoj. Krome, inter la influotoj troviĝas ne nur eksdommastrinoj kaj pensiataj stratfosistoj k.s., sed ankaŭ la estontaj plejgravuloj en la regis-taroj, komercistaroj, kaj intelektularoj de nia kontinento. Unike favoraj estas la ag-kondiĉoj, kaj unike potencaj povas esti la ag-rezultoj.

Enmensigu, do, la jenajn spertojn, kaj sekvajn konsilojn, de unu universitata klubo, kaj tiubaze ekestigu klubon por la Internacia Lingvo ĉe via kolegio. La unua ago de la Harvard Esperanto-Klubo estis akiri oficialan sankcion de la kolegio mem. Por tiu sankcio la du fondontoj reklamis afiŝe, ĵurnalanonce, kaj lange, por akiri la postulatan nombron da anoj. Sekve oni verkis ĉefregularon (statuton) kaj la anaro ĝin akceptis. Kelkajn formalaĵojn poste, la klubo estis sankciita. Pro la sankciiĝo, la klubo ekrajtis:

1. Uzi la nomon Harvard;
2. Uzi la multobligilon de la studenta komitato;
3. Uzi la universitatatajn afiŝ-tabulojn;
4. Aperigi senpagajn anoncojn en tri universitataj eldonaĵoj;
5. Okupi tablon ĉe la duonjara studenta registriĝo, por disdoni informon, vendi librojn, kaj kolekti anojn;
6. Senpage uzi klasĉambrojn por kunvenoj kaj lecionoj, kaj prelegejojn por prezenti filmojn, debatojn, fremdgastojn, ktp.

Krome, la sankciiĝo plifaciligis al la klubo:

1. Starigi ekspozicion en la kolegia librarejo, kaj poste en aliaj librarejoj kaj en bankfenestro;
2. Ricevi senpagan mencion de urbaj ĵurnaloj kaj radio-dissendejoj;
3. Rilatiĝi kun aliaj organizoj, lernejoj, ktp.

Je la komenco, la kluba laboro estis afero de nur unu-du homoj: neevitebla, sed tre evitinda, situacio. De la tempo kiam Zamenhof pene tiris la infanan Esperanto-movadon de sur sia dorso kaj postulis ke ĝi ekstaru kaj ekmarŝu proprakrure, la ĉefa enorganiza problemo estas la unuhomeco. Ĉe Harvardo, la klubo akiris en unu jaro firman bazon: elektitan estraron, kun tri aŭ pli da anoj (nuntempe kvar), kiuj dividas la laboron inter si pli-malpli egale, laŭ siaj personaj kapabloj. Krome, la kluba kaso, ricevante monon de kotizoj, donacoj, kaj, plej grave, librovendado, rapidas al plena memstareco. Fondinte klubon, vi estu certa ke, post via diplomitiĝo, la depreno de via tempo kaj mono de la klubo lasos ĝin ne kaduka, sed sana kaj daŭrema.

De la komenco, la plej grava kaj atentata klubafero estas la instruado. La nuna klubo estas almenaŭ la kvina Esperanto-organizo en la historio de la universitato; se klubo iam ĉesas instrui, post kvar jaroj ĉiuj Esperantistoj estos fordiplomitaj. Tial la nuna Harvarda klubo nepre instruas bazan kurson almenaŭ unufoje ĉiun duonjaron. En la unuaj kursoj, oni trovis ke granda parto de la studentoj povas lerni rapidege, ke ne interesas ilin lernolibra laboro, kaj ke ili estas pli lojalaj al siaj kolegiaj kursoj kaj ekzamenoj ol al sia flankokupo Esperanto. Tial, interne de unu jaro, la baza kurso evoluis de ok-semajna lecionaro kun cent-paĝa libro, al revolucieca unu-leciona kurso kun nur la anglaj Ŝlosilo kaj Vortareto, plus disdonita foliaro, kiel lernolibro.

Krom la baza kurso, la klubo funkciigas:

1. Kolekton de libroj kaj gazetoj, kiujn iu ajn rajtas pruntepreni;
2. Ĉiusemajnan "Esperanto-Tablon," t.e. porkonversacian vespermanĝon en unu el la kolegiaj furaĝejoj;
3. Ĉiusemajnan studrondon, ĉe kiu la anoj legas, aŭskultas sonbendojn, kaj diskutas. Studentoj kiuj ĉeestis la unu-lecionan kurson povas tuj eniri la studrondon; ili rapide akiras fluecon kaj vortprovizon, per konversaciado kun plispertuloj.
4. Sonbendan interŝanĝon pri seriozaj temoj kun alilandaj grupoj.

Ĉu vi opinias ke la Harvard Esperanto-Klubo sukcesas? Se jes, pripensu la jenajn faktojn: la klubo disdonis 2000 informfoliojn ĉe la lasta studenta registriĝo: 20 homoj venis al la unua leciono, 13 al la dua, kaj 4 al la lastaj du.

Al la unu-leciona kurso venis 28, sed nur 3 el tiuj eniris la studrondon. Ĉe prezentaĵo de japana vizitanto, f-ino Joŝiko Kaĵino, en iu mezlernejo, oni disdonis proksimume 50 informilojn, kun kuponoj por informpeto, kaj ricevis eĉ ne unu respondon. Tiuj rezultoj ordinaras! Atendu samspecajn ĉe vi, kaj nepre ne malesperiĝu! Ĉar kiel ĉe la glacimontoj kiuj naĝas en la polusaj maroj, tiel ankaŭ ĉe viaj sukcesoj: nur oneto videblas, sed tiu oneto kunportas kaŝitan ceteregon. Ĉe Harvardo, antaŭ la klubfondiĝo, multaj eĉ ne konis la nomon Esperanto, aŭ kredis ke ĝi estas la hispana. Post unu jaro, preskaŭ ĉiu harvardano scias almenaŭ kio estas Esperanto. Multaj el tiuj, kvankam ili ne havas tempon dum la studado por lerni la lingvon, nun favoras ĝin. Tio estas nia sukceso, ke ni influadas, kaj tiu influado konkretiĝos nur en diversaj estontaj jardekoj, en multe da manieroj, kaj en miloj da lokoj.

Ekagu, do, ĉar la rezultoj valoros la penon! Lumigu ĉies retinon kaj frapadu ĉies timpanon per la vorto kaj la lingvo Esperanto. Aparte uzindaj estas filmoj: laŭ harvarda sperto, ili logas pli da interesutoj ol iu ajn alispeca prezentaĵo. La Harvard Esperanto-Klubo pretas, laŭkapable, helpi vin komenci. Se vi sendos peton al la adreso, Quincy House Box 8, Cambridge 38, Massachusetts, Usono, vi ricevos ekzempleron de ĉiu, kiun vi deziras, el la jena listo: 1. la ĉefregularo de la klubo; 2. la unu-leciona kurso; 3. legaĵoj uzitaj en nia studrondo; 4. diversaj informiloj, afiŝoj, ktp., kiujn la klubo uzis; 5. respondoj al viaj demandoj.

Bonŝancon!

-- Jonathan Pool

^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^

## KIEL ONI POVAS FACILE ALLOGI LA VIRINOJN

Ridetu!

Foje, dum mi kuris por trafi subtrajnon kies pordaro jam komencis fermiĝi, mi hazarde ekpensis pri io komika (mi forgesas ĝuste pri kio) kaj larĝa rideto etendiĝis trans mia vizaĝo. Tiel klaŭnmiene mi eniris la trajnon kaj apogis min sur apogstango, furiozete spirante pro la kuro sed ankoraŭ ridetante. Blindige bela juna virino staris kontraŭ mi, rigardis min ridetantan, kaj ankaŭ ekridetis, kreante ian bonhumoran harmonion inter ni kvankam ni tute ne konis unu la alian. Mi transiris al ŝia flanko kaj demandis, "Ĉu vi eble scias, kiel oni povas atingi Bowling Green?" Nu ŝi tre bone sciis, ke Bowling Green estas la plej facile atingebla stacio en la tuta urbo, sed ne per tiu linio, sur kiu ni pasaĝeris; ŝi do respondis "La sekva haltejo." Kaj la sekva estis ŝia haltejo.

Depost tiam, mi serioze konsideris la principon de la rideto kaj ĝia utileco, kaj konkludis, ke en nia epoko la homoj tiom emas sulkfrunti, ke ridetanta homo elstaras. La rideto aparte taŭgas por instigi amikan senton ĉe virinoj, ĉar ili pretas kunrideti multe pli ol viroj. Malfacilaĵo tamen estas, ke oni ne ĉiumomente kapablas ekrideti, eĉ se oni vidas la plej belan virinon sur la tero. Mi do provizis al mi malgrandan stokon da aferoj, kiuj amuzas min - komika kartuno, burleska situacio, la Esperanto-movado -- ĉiuj almenaŭ dum provizora tempo bonaj ridetigoj.

Misrezulto povas okazi, kiam vi ridetas kun la intenco kaŭzi konversaciemon ĉe virino, sed ŝi ignoras vin kaj tute alia homo -- enuiga klaĉulino, kelnero, migranta samseksemulo -- vidas vin feliĉa kaj profitas la okazon molesti viajn orelojn pri io ne tro interesa. En tiu eventualo vi devas ankaŭ havi stokon da malridetigiloj -- la Kuba situacio, la degenerado de la civilizo, la Esperanto-movado -- por rapide forpeli la turmentanton. Sed gardante vin kontraŭ tiuj danĝeroj, elprovu la metodon. Almenaŭ vi lernos rideti, kaj tio nuntempe estas vera virtuozaĵo....

-- KLM

-----------------------------------

Karlo: Ĉu vi scias la diferencon inter elefanto kaj poŝtoficejo?
Tomaso: Ne.
Karlo: Ja estus senutile, sendi vin por enpoŝtigi leteron...

-- el "Nia Voĉeto"

# TRA MIAJ KVAR JAROJ KIEL STUDENTO EN UNIVERSITATO

Mi neniam antaŭe vidis tian periodon de persona kreskado (intelekta, socia, kaj emocia) kian mi vidis dum miaj kvar jaroj en universitato -- kaj probable mi neniam vidos denove tiel rapidan ŝanĝiĝon rilate al grado de progreso. Tamen mi kelkfoje miras, ke mi ja povis sukcese fini la postularon por la diplomo. Dum mia unua jaro mi komprenis, kiel prava estis la fakultatestro kiu diris, "La unua jaro estas la plej malfacila -- se vi ne malsukcesas tiam, tio preskaŭ garantias, ke vi licenciatiĝos el la universitato." Metite ne nur en novan ĉirkaŭaĵon sed ankaŭ en novajn kvalitojn kaj kvantojn de laboro, mi miras, ke mi ja povis alkutimiĝi sufiĉe al la kolegio por resti tie. Mi pasigis mian unuan jaron finante la ĝeneralan postularon kaj mi laboris apenaŭ sufiĉe por sukcesi; estis tre senkuraĝiga sperto.

Kolegistudado vere ne komenciĝis por mi antaŭ mia dua jaro. Depost tiam mi aliformigis la antaŭan sperton, senzorge entrepreni ajnajn kursojn, al aktiva sperto, entrepreni nur tiujn kursojn, kiuj helpos min iĝi instruisto de la franca lingvo en lernejo (tial mi entreprenis multajn kursojn en la fakoj de franclingvo, pedagogio, kaj psikologio). Mi estis vere bonŝanca, ĉar depost la tagoj en la gimnazio mi sciis, kio mi volas iĝi. Tio estis la sola ilo, kiu povus konduki min tra la vojo al feliĉa estonteco. Dum la unua jaro en la universitato mi lernis pri kursoj prezentataj, ĉu mi deziras entrepreni ilin, kaj kiel entrepreni tiujn kursojn, kiuj interesas min. Mia modus operandi tute ŝanĝiĝis, kaj dum la somero antaŭ mia dua jaro mi pensis forte pri tio, kion mi entreprenos dum la tri sekvontaj jaroj -- mi ŝanĝis malmulton de la plano depost tiam; plue, ĉiuj kursoj kaj ĉiu pensado direktiĝis al la sola profesia celo, kiun mi jam elektis.

Mi iĝis ekstreme plenmotiva kaj laboris pli forte ol iam antaŭe! Mi ankoraŭ subtenas kutimon, kiun mi komencis en mia unua jaro, mi skribas traktatetojn kaj rimarkojn pri io ajn, kio momente ŝajnas interesa aŭ grava. Mi pensis forte pri personaj duboj kaj problemoj; la ekzerco skribadi la pensojn ne nur produktis interesajn kronikojn sed ankaŭ helpis min solvi multajn problemojn. Mi ne scias ĉiujn solvojn al ĉiuj problemoj nun, sed mi kredas, ke mi scias la plejparton el la solvoj de tiuj problemoj, kiuj rilatas al la restaĵo de mia vivo. Mi evoluigis, mallonge, mian propran hejman filozofion per meditado -- specon de Weltanschauung! Tiuj paperoj traktis kaj faktojn kaj ideojn -- kiujn mi nomas la malaltaj kaj altaj signifoj de temomaterio, respektive. Mi ofte uzis strukturojn (Gestalten) en miaj pensoj kaj planoj; ili helpis min organizi miajn pensojn bone, kaj poste efektivigi ilin preskaŭ nur mekanike kaj senpene.

Dum mia tria jaro en la kolegio, mi legadis kaj meditadis. Mi rimarkis rezulton, kiun mi ankoraŭ ne nomis. Mi komencis miajn kvar jarojn en la universitato kun malvera, simpla vido de aferoj. La kursoj, kiujn mi entreprenis, kaŭzis en mia menso multajn dubojn kaj multe komplikis mian vidon. Post ol decidi la malfacilaĵojn, mi havis alian simpligitan vidon de aferoj -- sed simplecon formitan per decidita malsimpleco, kaj tiel tute malsimila al la antaŭa simpleco. Mi "trovis" min! Demandojn de granda signifo eksiginte, mi interesiĝis pli kaj pli pri detaloj. Mi ĉiam subtenis idealistan realismon -- mi interesiĝis pri tio, kiel aferoj reale estas, kiel ili devus esti, kaj kiel mi povas ekmovi ilin en la deziratan direkton. Kaŭze de la amasiĝinta forto de ideoj kaj laborkutimoj, kiujn mi nun havas, ne estas ia ajn malakcelo al atingo de mia celo. Male; ju pli mi proksimiĝas al ĝi, des pli forte kaj bone mi laboras por ĝi -- aferoj iĝas nur pli bonaj!

Mi nun estas en la mezo de mia fina (kvara) jaro ĉe la universitato. Per antaŭvido kaj entreprenado de kursoj dum la somero, mi nun havas trimestron da plejparte sendependa studado -- sendependa en la tuta senco de la vorto; mi povas fini ĉiujn diversajn aferojn antaŭ ol mi komencos praktikinstrui en mia fina trimestro -- kaj tio estas nenia postularo. Mi povas plene esplori ion ajn, kio interesas min, ĉar entrepreno de nur du kursoj donas al mi multan tempon -- mi vere kredas, ke ĉiu studento devus havi tian okazon.

Mi sentas, ke la finiĝo de miaj kvar jaroj en la universitato alvenos baldaŭ; ili estis kaj longaj kaj mallongaj. Ĉiam antaŭen direktate, mi rigardas feliĉan estontecon!

-- Thomas H. Goodman

# O P I N I O

Kara JEN,

Pri via Bulteno, mi devas vin gratuli; la enhavaĵo estas sufiĉe bona. Se la tempo lasus al mi paroli, mi certe ŝatus respondi al la letero de EGC! Miaopinie, vera ateisto ne ekzistas! Zamenhof estis homaranisto en la plej bona senco de la vorto; la ideo de ateismo certe estis anatema al li.

-- Elwyn Pollock
El Cajon, Kalifornio

- - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Kara Redaktoro,

En la interesa recenzo pri "Monda Kulturo" (januara n-ro) oni demandas pri la "beletraj fakterminoj." Jen mia vidpunkto: certe la aŭtoroj ne intencis ilin kiel ian apartan fakterminaron, sed kiel ordinarajn vortojn por ordinara uzado. Estus katastrofe, se en Esperanto iam komencus aperi leksikona distingo inter la literatura kaj la parola lingvoj. En la realo, mi opinias, granda parto de la "novaj vortoj" kiuj penetris en la ordinaran lingvon venis unue en literaturaĵoj. Tiun kutimon iniciatis Zamenhof mem, kiu per sia amasa tradukado de libroj kc. riĉigadis la lingvon. (La alia fonto, leksikonoj en kiuj oni proponis novajn terminojn, feliĉige nun ŝajnas malvigla. Ni bezonas malpli da apriora leksikologio kaj pli da aposteriora registrado de la vera uzado.)

(Mi atentigas, ke unu el la "glositaj vortoj" en Monda Kulturo numero 1 tamen estas oficiala vorto! Temas pri "aserti.")

Certe, oni devus uzi tiujn proponatajn vortojn, kiuj estas utilaj kaj indaj. Nia lingvo ankoraŭ ne estas tute kompleta. Mankas multaj terminoj por ĉiutagaj objektoj kaj spertoj, kaj ankaŭ multaj nuancoj malfacile esprimiĝas. Nur oni devas esti tre singarda. Atentinda parto de la proponataj novaj vortoj ĉiam ekzistas, ne pro bezono, sed ĉar la aŭtoroj ne sufiĉe konas la jaman vortprovizon de la lingvo. Kiel redaktoro, mi ofte spertis ke kontribuantoj uzadas neologismojn kaj strangajn formojn, nur ĉar ili ne scias la ĝustajn vortojn. Pri tio grandparte kulpas la tre malbona stato de la angla-esperantaj vortaroj. Nia Fulcher and Long, neniam tre bona leksikono, estas jam antikvega; la Edinburgh, bona sed tre malgranda.

Mia konsilo: mem verkante artikolon aŭ ion esperantan, aŭ parolante, evitu uzi neoficialajn terminojn, ĝis vi estos certa ke vi scias ĉiun oficialan terminon. Tio ne estas tro terura tasko. Ekzistas nur 4,536 oficialaj radikoj. (Laŭ la kalkulo eldonita dec. 1958 de la Akademio de Esperanto.) Poste, vi estos pli kompetenta, decidi kiujn neoficialajn radikojn uzi kaj kiujn ignori.

Unu malaprobinda karakterizo de "Monda Kulturo," heredita el "Belarto," estas ke S-ro Auld ŝajne timas korekti la manuskriptojn sufiĉe. Tiel, li enlasas evidentajn pens- kaj lern-erarojn, kune kun la aprobindaj nekutimaĵoj. Lia artikolo en la dec. UEA-Gazeto "Esperanto" estas ĉiel aklaminda. Sed li ne ĉiam klare distingas la aprobindajn kaj la neaprobindajn.

Kun salutoj,
Donald Broadribb
Mooney Ponds,
Aŭstralio

^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^

DANKON al Esperanto Scientific Center pro uzo de tajpilo kaj ceteraj utilaĵoj.

^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^

PEJ iniciatis vastan diskuton pri la problemoj de E-Movado kaj junularo. Aperis serio da artikoloj en TAMEN, okazis publikaj diskutoj dum PEJ - kaj TEJO-kunvenoj. La E-Movado urĝe bezonas novajn metodojn por progresi. Multaj obstakloj, kiuj obsedas PEJ, estas komunaj ankaŭ al aliaj organizoj, speciale la freŝfonditaj. Tial, kun danko pro via atento al ĉi tiuj miaj notoj, mi esprimas la esperon, ke JEN kontribuos al la internacia diskutado por progreso kaj futuro de la tutmonda E-junu lar -movado.

-- Marius C. Dastych

## LA IRLANDLINGVA MOVADO

En nur unu eŭropa lando estas la oficiala celo de la regado la ŝanĝo de la arolata lingvo de la loĝantaro. Nur unu eŭropa edukosistemo penas anstataŭigi la hodiaŭan lingvon de sia lernantaro per lingvo parolita de la prapatroj antaŭ ent aŭ ducent jaroj. Kaj en nur unu eŭropa lando obstine kontraŭstaras la plimulto de la civitanaro tiujn penadojn subpremi lingvon, kiu estas teorie fremda, sed efektive preskaŭ universale indiĝena.

Antaŭ cent kvindek jaroj, la plimulto de la Irlanda loĝantaro parolis nur irgaele. Antaŭ ankoraŭ aliaj cent jaroj, la angla lingvo estis preskaŭ nekonata tie. Irlando tiam estis subpremata provinco de la brita regno. Kaj nun, kiam estos Irlando memstara nacio? Nur unu el dek irlandanoj parolas la irgaelan kiel lingvon indiĝenan, nur ankoraŭ alia bone scipovas ĝin, kaj nur unu el kvindek loĝas en distrikto, kie tiu lingvo estas uzata kiel perilo de ĉiutaga komunikado. Jam ne ekzistas konteo, en kiu la plimulto parolas irgaele, kaj ĉiujare la nombro da indiĝenaj parolantoj malpliiĝas.

La laborado de la registaro, unue, ne povas ĉesigi ĉi tiun procedon. Estas tro da kontraŭaj faktoroj. La malriĉeco de la lando devigas multajn junulojn forlasi ĝin, kaj tiuj distriktoj, kie oni parolas irgaele, estas ofte la plej malriĉaj. Plue, estas fortega angla kaj usona influado sur tiuj kiuj restas en Irlando, pro komerco, distrado, kaj turismo. Kaj plej bedaŭrinda estas la indiferento, ofte la ofendiĝo de multaj irlandanoj mem, kiuj inklinas rigardi sian nacian lingvon kiel malagrablan malŝparon de tempo.

Feliĉe, estas multaj irlandanoj kiuj provas helpi la redisvastigon de la lingvo. La Gaela Ligo provizas instruadon al tiuj, kiuj ne povas studi en lernejo. Alia organizo, "An Fáinne" (La Ringo -- ĉar la membroj portas oran ringon kiel ni portas la verdan stelon) penas stimuli la uzadon de la lingvo en la ĉiutaga vivado. Nova grupo, "Gael Linn," provas plibonigi la ekonomian staton de la gaelparolaj distriktoj.

Ankaŭ ĉi tie en Nov-Jorko estas organizaĵo, "La Nov-Jorka Gaela Asocio," de kiu mi estas membro. Nia celo estas la diskonigado de la irlanda lingvo kaj kulturo en Usono. Ni havebligas instruon pri lingvo kaj popoldanco vendrede, je la oka horo, ĉe la lernejo de la Preĝejo de S-ta Paŭlo (sur 60a str. inter avenuoj Colulmbus kaj Amsterdam).

Ĉu la gaela movado sukcesos? Kiu scias? Ni povas nur penadi.

-- Walter Stock

^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^

Ekzistas dubo
Pri tiu klubo
Kies anoj
Lingvopropagandon fari
volas
Kvankam nek skribas
Nek parolas.

-- Marius Dastych
en "TAMEN"

^^^^^^^^^^^^^



"Sed la gramatiko ne interesas min; temas pri la vivo de simpla ĵazmuzikisto....."

### Al Fervorulo

Vi, de l' ideo fidela servanto
Post konsidero respondu al
mi:
Ĉu dank' al vi famiĝas
Esperanto,
Ĉu dank' al Esperanto - vi?

-- Roman Dobrzynski
en "TAMEN"

# Libro-Servo de JEN

**L E R N U** : -- Kion signifas la literaturaj konceptoj de Esperantaj verkistoj!


**P L I B O N I G U** : -- En via kapablo kaj kompetenteco esprimi vin per Esperanto!

**L E G U** : -- La literaturon de la Lingvo Internacia!

**U T I L I G U** : -- La novan libro-servon de JEN kiu povas provizi verkojn de centoj da aŭtoroj de la pasinteco kaj de la nuntempo! Ampleksajn listojn de haveblaj libroj ni sendos al la gemembroj dum la venonta semajno.

La nomo kaj adreso de nia nova libro-servo estas: --

Esperanto Libro-Servo de JEN
P.O. Box 315
Brooklyn 11, N.Y.



POLA ESPERANTO-JUNULARO .... KELKAJ FAKTOJ

Komence neglektata junularo fine trovis sian lokon en la E-Movado. La fakton de progreso atestas multaj aktivecoj de TEJO kaj formiĝo de la novaj landaj societoj, el kiuj JEN estas plej freŝdate konstituiĝinta. TEJO, kiu koordinas la junularan movadon internacie, reprezentas grandan variecon de la membro-organizoj, kiuj diferencas en nombro da anoj, strukturo kaj metodoj de laboro. Miaopinie, estus interese prezenti ceterajn junular-organizojn al la membroj de JEN. Ĉar mi laboris por P.E. Junularo, mi povas doni al vi kelkajn faktojn pri movado en Pollando. Espereble sekvos similaj raportoj pri aliaj sekcioj de TEJO sur la paĝoj de tiu ĉi Bulteno.

.. .. .. .. .. .. .. ..

Pola Esperanto-Junularo fondiĝis en 1958, dum la Tutpollanda E-Kongreso en Krakovo. En 1953 PEJ plenumis unuan gravan taskon, organizante en Gdansk la 15an Internacian Junular-Kongreson de TEJO. Partoprenis en ĝi ĉ. 300 reprezentantoj el 15 landoj. Sukcesa junulara kongreso plifortigis la novan organizon. Novaj lokaj societoj fondiĝis, aperis la unuaj numeroj de TAMEN -- organo de PEJ. PEJ komencis kunlabori kun ne-esperantista junulara movado, precipe tiu de la studentoj. Fondiĝis E-kluboj ĉe Jagellona Universitato (Krakovo) UMK (Toruń), Varsovia Universitato, kaj Katolika Universitato en Lublin. Post la kongreso multaj artikoloj aperis en la pola gazetaro, kiu ĝenerale favoris raportojn pri Esperanto (interese scii, ke dum la IJK estis eldonata speciala numero de la loka gazeto, en Esperanto).

PEJ estas formale sekcio de Pola E-Asocio kaj membras en TEJO. Dum lastaj jaroj ĝia nombro da membroj variis inter 500-1000. Laŭ statuto, al PEJ apartenas membroj de PEA ne pli ol 25-jaraĝaj. PEJ elektis estraron kaj leĝdonan Komitaton; la bazo de la organizo estis lokaj rondoj, kluboj kaj lernejaj aŭ universitataj societoj. Estraro kaj Komitato dividis sian laboron en sekcioj (informado, turismo, studentoj ktp.). La okazo renkontiĝi kaj decidi pri la estonteco de PEJ prezentiĝis dum ĉiujaraj Kunvenoj (1959-Toruń, 1960-Gdansk, 1961-Bydgoszcz, 1962-Bytom), ĝis nun kvar.

Dum la Kunvenoj estis ellaboritaj juraj principoj kaj programo de agado por la tuta organizo. El la ĝeneralaj aktivecoj mi citu kelkajn: kursoj de E-o en junularaj organizoj kaj gazetoj; informado por la gazetaro, radio, kaj propra organo (TAMEN); kulturaj aktivecoj -- kabareto "Verda Simio," korusoj, artensembloj dum Kunvenoj, oratoraj konkursoj, ekspozicioj; eksterlandaj ekskurzoj por membroj kaj oficiala partopreno en 16a IJK en Rotterdam, 45. UK en Bruselo (1960), 17a IJK en Wokingham, 46a UK en Harrogate, 18a IJK en Ystad, 47a UK en Kopenhago kaj aliaj internaciaj renkontiĝoj; internaciaj tendaroj kaj someraj renkontiĝoj en Pollando (Wista, Gdansk 1960-62). Membroj de PEJ aktive partoprenas en internacia junulara E-Movado: Marek Pietrzak estas vic-prezidanto de TEJO, Mag. Roman Dobrzynski estas aktuala Prezidanto de PEJ kaj laboras en Komitato de TEJO, en kiu partoprenas ankaŭ aliaj poloj; Mag. R. Skalinski prezidas STELOn (internacia studenta organizo). El specialaj aktivecoj de PEJ mi menciu fondiĝon de la Centro de Esploroj pri Afriko, kiu celas altiri publikan atenton al bezono de Internacia Lingvo sur la Nigra Kontinento. Estas interese, ke en la Centro laboras esperantistoj el Afriko (studentoj ĉe polaj universitatoj). Membro de PEJ -- Andrzej Pettyn -- ellaboris allogan metodon de E-instruado, kiu populariĝis lastatempe inter la instruistoj.

Progreson de Pola junulara E-Movado atestas i.a. nombro da partoprenintoj en Kunvenoj de PEJ. Dum la unua Kunveno en Toruń partoprenis ĉ. 50 personoj, la lasta en 1962 en Bytom nombris 450 gepartoprenantojn, kaj ĉeestis gastoj el kelkaj aliaj eŭropaj landoj.

Por konkludi, mi volas atentigi pri multaj obstakloj kaj malfacilaĵoj, kiuj baras progreson de junulara movado en Polujo. Inter ili la plej danĝeraj montriĝis:

1) malaprobo fare de ĝenerala "oldula" movado.
2) financaj problemoj (manko de subvencio).
3) limigita partopreno en internaciaj E-manifestacioj (politikaj kaj ekonomiaj kaŭzoj).

→

## KIO ESTAS NOVA?

-- Esperanto oficialiĝos en la Grekuja lernejo-sistemo, raportas Le Courrier, periodaĵo de UNESKO eldonata en Francujo. Ĉu tio povas klarigi la misteran aludaĵon en la artikolo de Simo MILOJEVIĆ en la jul.-aŭg. numero de Esperanto?

-- JEN havos paĝon en North American Esperanto Review, organo de ELNA, ekde la venonta numero. Humphrey TONKIN prizorgos ĝian surhavon. Krome la Review montras bonajn eblecojn grave pliboniĝi en sia formato kaj ofteco de apero. Se vi ĝis nun ne aliĝ-abonis -- faru ĝin tuj!

-- Japana E-ista Junulara Organizo (JEJO), nova TEJO-sekcio tre grava por la tutmonda junulara movado, formulis statuton la 23an de aŭgusto 1962. Sidejo kaj Administrejo: Japana Esperanto-Instituto, 1-13 Motomachi, Bunkyo-ku, Tokio. Prezidanto estas s-ro Joŝimi Umeda ĉe: Oomoto, Kameoka, Kioto-hu.

-- La Ges-roj G. A. CONNOR, dum antaŭaj jaroj aktivaj kaj bonkonataj E-istoj de nia urbo, nuntempe loĝas en Portland, Oregono.

-- JEN okazigos kongreseton dum la ELNA-Kongreso en Pittsburgh ĉi-somere. Detalojn poste.

-- JEN starigas sian propran libro-servon. Detaloj en la sekvonta numero.

^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^

## LA BONA VIVO
(Parto 3a)

Mi meditis momente. Frederiko nun levis iom delikatan temon, ĉar mi dum tiuj tagoj emis defendi tion, kion la plimulto atakas, laŭ la teorio, "se la publiko ignoras aŭ malaprobas ion, tio nepre devas havi ian meriton." Kaj tiu teorio ne ĉiam montriĝis sensenca.

"Nu?" diris Frederiko (ankaŭ li konis la teorion).

"Mi cedas al vi vian kontraŭ-bitnikan senton..."

"Koran dankon; sed mi ĝis nun ne menciis ion tian."

"Ha, ĝi kuŝas implice en via provo riproĉi min per nura ekmencio de tiu vorto. Verŝajne vi opinias ke, liginte etikedon al io, vi rajtas sen plua prokrasto formeti ĝin en la arkivon."

"Tute ne," respondis li, "Honeste mi volas elaŭdi vin pri la Bona Vivo, sed viaj ideoj ŝajnas al mi tute nepraktikeblaj, tute reve kaj idealiste bazitaj, kaj nur tio memorigas min pri la bitnikismo."

"Hm. Sed la provon, kunigi la 'artan' kaj la 'ordinaran' vivojn en unu, mi jam ilustris per praktika ilustraĵo. Oni povas komenci ĉe la komenco, ordigante la etajn aferojn de la vivo kaj sin liberigante por aliaj okupoj; kaj, tiel malkarambolante sian vivon per faciligado de ĉiutagaĵoj oni nepre trovas, ke la arto estas nur samspeca faciligado de la mensaj kaj spiritaj emoj. Kiel parolata lingvo povas esti flua, la pensado verŝiĝante kvazaŭ rivero en la paroladon, tiel ankaŭ la vivo povas esti flua, kontinua. Kiel la parolado konkretigas la pensadon, tiel la arto konkretigas kaj donas esprimon al la vivo -- sed ĝi neniamaniere kreas apartan vivon! Kvazaŭ la vivo estus ŝoseo kondukanta sur ponton, kaj oni ekveninte sur la ponton konstatas, je sia surprizo, ke tiu ponto estas nur daŭrigo de la ŝoseo."

Frederiko deprenis siajn okulvitrojn kaj komencis poluri la lensojn.

"Pli-malpli mi komprenas," li diris oscedante, "Ke vi pro nekutime superŝuta dozo da egoismo kredas -- eble sincere, eble sintrompe -- ke vi povas fari arton el via mizera ekzistado, kaj ke tio iamaniere savos vin el alie sensignifa vivrolo. Konsentite, vi povas tiel enperforti signifon, artefare; en tiu rilato vi similas al la religianoj."

"Ĉu riproĉinde?" instigis mi.

"Nu," respondis mia amiko, avertvoĉe, "Vi devas scii, ke estas tri temoj malpermesataj al la ĝentila konversacio: la religio, la politiko, kaj la sekso. Se mi nun indulgos vin pri la unua, vi eble ne detenos vin de festego pri la aliaj! Eble vi eĉ proponos tiun ideon, ke ankaŭ la religio estas formo de arto, sekve via ellitiĝo estas ia ofero al Dio kaj garantias, ke vi staras en bonaj rilatoj kun la estantaj Povoj..."

"Mi ja ne estus tre adekvata bitniko, se mi tiel asertus, ĉu?"

"Vere ne," respondis Frederiko, "Sed vi estus tre adekvata anakronismo, ĉar la ideo aŭdiĝas iom helena!"

Ride mi ekfrapis al mi la frunton.

"Do: unue mi kultis Ben Franklin, due mi estis bitniko, kaj nun mi eble estas 20a-jarcenta heleno! Eble mi nur estas aktoro!"

"Tre eble; pensu pri tio!"

Tre eble. Kaj mi ja pensis pri tio. Dume mi kaj Frederiko ja esploris la tri malpermesatajn temojn -- kaj multajn aliajn. En ĉiu diskuto tamen, Frederiko ŝajne havis la lastan vorton, ĉar malgraŭ ĉio, ĉu ne temas pri aktorado? En iu senco? Mi simple esperas, ke la homo eterne havos la rajton elekti sian propran rolon -- obstine, egoisme, kuraĝe elekti sian propran Bonan Vivon.

(konklud~~ita ata~~)

FINO -- KLM

^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^ ^

A L I Ĝ U  A L  J E N


A L I Ĝ U  A L  E L N A

A L I Ĝ U  A L  U E A

Junularo Esperantista De Nord-Ameriko
New York ... N. Y.
United States of America

NEW YORK 1, N.Y. 1963

BUILD YO... WISELY U.S. SAV...




ive